

## & Duelo:

< Rekante 20 el 43 batoj por strofo, entute 301 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per rusa melodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:43> (

a;Mi /MiMi MiMi doMi MiMi FaRe e;Re ReRe ReRe FaFa MiRe Do;Mi FaFa FaFa  
MiMi ReTI ReDo o;La LaLa LaLa LaLa SiLa Ti

(#Rekantaĵo: i;Mi dodo dodo do Ti rere doTi Ti La; La LaLa Sodo mimi rere mifa mi;  
dolLa MiMi Tido La)

)×7 )+

### (& Strofoj:

'1 Nek vorton plu! Sed vire prenu  
spadon – ; Kaj juĝu nin hazarda, blinda  
sort'! ; Ne vane mi ellernis la  
skermadon, ; Kaj volus mi nun ridi pri  
la mort'!

(×: **Nin ligas kuna koro kaj pasia  
amo ; Mi ne kapblas ĝin forlasi pro  
perfid' ; Ni2n ligas kuna kor'.**)

'2 La koron mi ne havas plu virinan, ;  
En krustojn ĝi sin kaŝis de l' kompat', ;  
Mi sentas nur vengemon kaj senfinan ;  
Deziron: vin trapiki, malammat'! .....

'3 Ne miru do kaj ne aspektu stulta! ; Al  
batalpoz'! Eĉ kontraŭ la edzin'! ; Ŝi  
rajtas ja pro via krim' adulta ; Batali,  
por en sango venĝi sin. ....

'4 Kaj kruce tuj premiĝis fleksaj spadoj,  
; Per fulma bril' ekludis glata ŝtal', ;  
Kun ĉiu mov' varmiĝis la spiradoj, ;  
Por morta bat' sin klinis la batal'. .....

'5 Venuso mem ne povus ŝin superi ;  
En la graci', elekto de la poz'. ; Kaj tra  
la hont' komencis li fieri ; Pri tiu mikso  
el tigro kaj mimoz'. .....

'6 Sed kiam ŝi rimarkis strion ruĝan ;  
Sur lia kol' – ŝi spadon ĵetis for, ; Kaj  
kun ekĝem' la baton sangojuĝan ;  
Malbenis tuj en la tremanta kor'. .....

'7 Ne pro la vund' malgrava. Pikis  
larmoj, ; Pro kiuj ŝi rekonis sin – virin',  
; De mola kor', ne taŭga por la armoj, ;  
Kun stranga em': pardone kisi lin. .... )